BRAZILA ESPERANTISTO OFICIALA ORGANO DE BRAZILA ESPERANTO-LIGO

ISSN 0006-9477

BE 336
Februaro 2011

Judaso Ahasvero

Euclides da Cunha

2010

5-a Esperanto-Kongreso de Sanpaŭlo

Brazila Esperantisto

Nacia kaj Internacia Kulturo

N-ro 336 • Februaro 2011

Brazila Esperanto-Ligo

Kovrilo

La regionon de Alta Puruso esploris Euclides da Cunha. El tiu ekspedicio li ĉerpis materialon por verki la rakonton *Judaso Ahasvero.*

Enhavo

04 **Ĉefartikolo**

05 **Kial kaj kiel ekzameniĝi pri Esperanto:** Paulo Nascentes

10 **Judaso Ahasvero:** Euclides da Cunha

15 **La Sinonimludo:** Francisco Stefano Wechsler

16 **La nominalverba karaktero de la aspekto en Esperanto:** Maria Nazaré Laroca

22 **Kriptogramo:** José Saraiva Matos

UEA unuigas do ne ĉiujn esperantistojn, sed ĉiujn esperantismanojn, t.e., ĉiujn tiujn homojn, kiuj konsideras ne nur Esperanton en ĝia ekstera lingva formo, sed ankaŭ ĝian internan ideon.

L.L. Zamenhof

Revukunlaboraĵoj: La ĉefredaktisto rigardas gravaj la kunlaboraĵojn senditajn de legantoj. Tamen, pro hommanko, spaclimigoj en la revuo, kaj kromaj limigoj, li rezervas al si la rajton: **1-e:** Ne sciigi la ricevon; **2-e:** Ne redoni la sendaĵojn; **3-e:** Ne garantii la publikigon; **4-e:** Mallongigi tekstojn tiam, kiam necese; **5-e:** Ĝin reviziigi laŭ ortografia, gramatika kaj terminologia aspektoj. Kiel gramatikan konsultfonton ni rekomendas la verkon "Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko", de Bertilo Wennergren. La signifon de ĉiuj vortoj netroveblaj en "Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto" (2005) oni aparte klarigu per glosaro.

Anonctarifo: Tabelo pri prezoj (Brazila Esperantisto). Onoj de paĝoj (anoncoj). • Komercaj markoj reproduktitaj celas nur ilustri kaj apartenas al la posedantoj.

tutpaĝa (19x25cm)
4-a kovrilo R$ 900,00 (kolora)
2-a kaj 3-a kovriloj R$ 600,00 (nigra-blanka)

1/2 duonpaĝa (9x24cm)
R$ 450,00 (kolora)
R$ 300,00 (nigra-blanka)

1/3 trionpaĝa horizontale (8x18cm) R$ 300,00 (kolora)
R$ 200,00 (nigra-blanka)

1/3 trionpaĝa vertikale (8x18cm) R$ 300,00 (kolora)
R$ 200,00 (nigra-blanka)

1/6 sesonpaĝa (7,8x8cm)
R$ 150,00 (kolora)
R$ 100,00 (nigra-blanka)

Estimataj Gelegantoj:

Tiu ĉi numero enhavas multe da materialo por pripensado. Nia unua artikolo, verkita de s-ano Paulo Nascentes, pritraktas gravan temon por instruistoj de Esperanto, nome, la ekzamenojn laŭ la Komuna Referenc-kadro, aplikatajn de UEA. Pritaksado de lingvoscio ĉiam kaŭzas debatojn, kaj probable oni neniam atingos unu-animecon ĉi-rilate. Tamen jam venis la tempo, por ke ni brazilanoj serioze diskutu, kiom niaj lernantoj efektive regas la lingvon je kursofino.

Sekvas la kovril-artikolo: *Judaso Ahas-vero*, rakonto verkita de la fama brazila aŭtoro Euclides da Cunha, tradukita de s-ano Benedicto Silva. Ĝi temas pri la tradicia brazila kutimo fari Judasan pupaĉon en resurekta sa-bato. Sed tiu ĉi tradicio posedis apart-ajn karakterizojn en la kaŭĉukrikolta regiono de Supra Puruso.

Poste ni denove ludos per kelkaj sinonimoj: ĉu vi scias distingi inter *senti*, *sensi*, *percepti*, *rimarki* kaj *sperti*? La diferencoj estas ofte subtilaj, tamen ja penindas studi ilin!

S-anino Maria Nazaré Laroca resumis kaj tradukis sian doktorigan tezon pri la *Nominalverba karaktero de la as-pekto en Esperanto.* Per ĝisfunda analizo kaj abundaj ekzemploj ŝi dissekcas la rimedojn, per kiuj oni en Esperanto esprimas la daŭran, finan kaj estontan aspektojn. Ne temas nur pri participoj, sed ankaŭ per pluraj aliaj sintagmo-tipoj.

Ni finas per unu plia enigmo verkita de s-ano José Saraiva Matos, omaĝe al du forpasintaj batalantoj de la brazila movado. Amuzu vin per ĝi kaj esper-inde ankaŭ lernu ion!

Bonan legadon!
La ĉefredaktisto

Brazila Esperantisto
ISSN 0006-9477
Oficiala Organo de Brazila Esperanto-Ligo
Fondita en 1907 de Alberto A. Vieira, Reynaldo Geyer kaj Everardo Backheuser
Februaro 2011 - N-ro 336

Eldona Stabo
Respondeca ĵurnalisto: Alberto Emerson Werneck Dias
Ĉefredaktisto: Francisco Stefano Wechsler
Ĉi-numeraj kunlaborantoj: Maria Nazaré Laroca, Francisco Stefano Wechsler kaj Paulo Nascentes
Grafika aranĝo kaj enpaĝigo: Joseo Tenorjo
Revizio kaj tradukado: BEL-asesorskipo

Kontribuaĵojn kaj mesaĝojn sendu al: bel@esperanto.org
Pri la subskribitaj artikoloj respondecas la aŭtoroj mem

Brazila Esperanto-Ligo
Fondita en 1907

Sidejo: Ed. Venâncio III – Sala 301/303. Setor de Diversões Sul
Poŝtadreso: Caixa Postal 03625, CEP 70084-970 Brasília – DF
Telefono: (0xx61) 3226-1298 **Fakso:** (0xx61) 3226-4446
Retadreso: bel-co@esperanto.org.br **Hejmpaĝo:** www.esperanto.org.br

Estraro
Prezidanto: Lício de Almeida Castro **Vic-prezidanto:** Eurípedes Alves Barbosa
Financdirektisto: João Osvaldo Pestana **Kasisto:** Darci Gomes Sardinha
1-a Sekretario: Sufia Alves de Lima **2-a Sekretario:** Carlos Alfredo Aragón Guerrero
3-a Sekretario: Devanízio Apolinário dos Santos

Kontrola Konsilantaro
José Carlos Dorini Ramos, Aymoré Vaz Pinto, Adolpho de Miranda Silva, Lia Milhomem Moreno, Evandro Ferreira de Avellar kaj Cleto Galvão da Silva.

Komitatano kaj Ĉefdelegito de UEA
James Rezende Piton

Kial kaj kiel ekzameniĝi pri esperanto?

Paulo Nascentes

Enkonduko

Internacia Lingvo (ILo) estas ilo. Ne nur, sed ankaŭ ilo. Plibone dirite, internacia komunikilo. El tio venas la unua celo de ĝia lernado, instruado kaj pritaksado: norm-mezuri plejeble fidele la akiritan lingvan komunikkapablon de ĉiu lernanto. Ankaŭ estas fakto, ke oni agas laŭ diverstipa motivaro. Nepras do konsideri tiujn diversajn eblojn kaj naciskale kaj mondskale. Se estos sufiĉe bonaj motivoj por ekzameniĝi inter brazilaj lernantoj de Esperanto, praviĝos kundiskuto pri brazila ekzamentipo, ĉu tute sendepende de internacia sperto, ĉu sinergie rilate al alilandaj solvoj. Respondoj eblaj al tiu kaj aliaj demandoj gvidas ĉi artikolon. Malnecesas emfazi, ke ĝia celo estas kunigi disajn informojn pri la temo por pli taŭge diskutigi ĝin. La plej bona ekzamen-modelo por Brazilo estos kompreneble tiu, kiu kontentigos la plejparton de nia agema instruistaro kaj tiu fine agordiĝanta al niaj kulturaj trajtoj. Inviton al pli funda diskuto kaj koncerna ago celas tiu ĉi modesta kontribuo.

Kial ekzameniĝi?

Kompreneble unue venas alia demando, malfacile respondebla laŭ mia sperto. Kial brazilano sin motivas lerni Esperanton? Konsiderante la preskaŭ sufiĉe bonan kapablon kompreni kaj sin komprenigi de brazilanoj dum konversacioj kun siaj plej proksimaj hispanoparolantaj najbaroj, kial do studi internacian komunikilon? Nur pro tio, ke ĝi supozeble estas “facila lingvo”? Ĉu nur tio estas sufiĉe bona motivo? Alparoli niajn sudamerikajn najbarojn estas ankaŭ sufiĉe facile, kiam kompreneble ambaŭ interparolantoj decidas faciligi la interkomprenon, ĉu ne? Se tamen oni deziras ampleksigi personan amikaran reton, aŭ vojaĝi alikontinenten, eblas kompreni tiun deziron. Tiel, la lernado de Esperanto praviĝas. Inter tiuj, kiuj mem aŭ helpe de kurso lernas Esperanton, certe multaj scivolas pri sia lingvokono kaj parolkapablo post lernoperiodo. Ekzamensesioj kadre de brazilaj aŭ tutmondaj kongresoj sukcese ĉiujare okazas, kaj multaj kandidatoj kutime sin prezentas. Kadre de universalaj kongresoj tiuj eventoj reprezentas atendatan programeron kaj efektivan monkolekton por organizantoj. Aparte en eŭropa kunteksto, nuntempe, tiuj eventoj abundas, kadre de partnera laboro inter UEA/ILEI kaj Edukado.net, kiu profesinivele aranĝas la menciitajn ekzamensesiojn.

Kio estas UEA/ILEI ekzameno?

Pri tiu punkto eblas trairi almenaŭ du vojojn: a) esplori fakajn publikaĵojn; b) memori personan sperton. Per tiu ĉi lasta mi komencas. Dum la 22-a Printempa Semajno Internacia[1], okazanta dum la pasko de 2006 en la germana urbo St. Andreasberg, gvide de ILEI/UEA, instigite de D-rino Zsófia Kóródy, estrarano de ICH — Interkultura Centro de Herzberg[2], mi decidis meznivele (laŭ la iama terminologio) ekzameniĝi. Kaj la skriba kaj la parola sesioj postuladis konojn kaj informojn

pri gramatikaj punktoj (uzo de prepozicioj, de ig- aŭ iĝ-vortoj, de pronomoj), pri movada historio eŭrocentrita, pri literaturo kaj redaktado. Sukcesintoj en la skriba parto rajtis partopreni la parolan sekcion. Demandis min pri similaj temoj tri komisionanoj, nome Peter Zilvar (ICH), Stefan Macgill (ILEI) kaj Zsófia Kóródy (ICH). Laŭvice, unu el ili paroligis min unue pri mia vivstilo, profesio, preferoj kaj poste pri konkretaj situacioj montrataj de bildoj. Ili ankaŭ instigis min opinii pri diversaj temoj. Kiam la demandoj temis pri E-literaturo, precipe el eŭropaj verkistoj, mi proponis komenti, anstataŭe, la poezian verkaron de la konata brazila akademiano Geraldo Mattos, kaj feliĉe ili tion konsentis. Tion mi faris kaj sukcesis aprobiĝi. Malfacila estis tiam tiu ekzameno por mi. Tri jarojn poste, dum la UK en Bjalistok, mi kandidatiĝis por la nivelo C1, la supera nivelo, laŭ la nomenklaturo de KER. Tiam la novtipa ekzameno laŭ KER ekfuroris en Eŭropo. Male la antaŭan ekzamenon, tiu de la 94-a UK reliefigis la kapablon kompreni kaj redakti tekstojn pri abstraktaj temoj, defendi vidpunktojn per taŭgaj argumentoj kaj analizoj. Jen bona referenco, kie eblas plibone informiĝi pri la novtipa ekzameno[3].

Kiel ĝi funkcias?

Se oni komparas la antaŭan kaj la nunan version, eblas konstati la emon al plia efikeco. Tio estas rezulto de normigo de tiaj lingvo-ekzamenoj en la tuta Eŭropo, laŭ instigo de la Eŭropa Konsilio. "Komuna Eŭropa Referenckadro por lingvoj: lernado, instruado, pritaksado de lingvoj"[4] estas dokumento nepre konsultinda kaj studinda, pro ĝia tre utila enhavo. La antaŭe menciitan retejon mem ni rekte citu: "La ekzamenoj konsistas el tri partoj: gramatika antaŭtesto, skriba parto kaj parola parto. Nur sukcesintoj en la gramatika antaŭtesto rajtas partopreni la skriban parton de la ekzameno kaj, atinginte en tiu skriba parto la sukceslimon de 60 poentoj (el 100), la parolan parton".

Tiu sistemo, pedagogie pli moderna, fakte preterlasas la memorigon pri historiaj faktoj kaj nomoj de elstaraj verkistoj, kaj reliefigas tion, kio vere gravas, "la kapablon praktike uzi Esperanton". Laŭ la sama fonto, la estraro de UEA rekomendas ke ties delegitoj "atingu almenaŭ la nivelon de la meza ekzameno". Simile, laŭ la regularo pri la nova ILEI/UEA ekzameno pri instru-kapablo, "kandidatoj devas posedi Esperanton minimume ĝis la nivelo de la meza ekzameno de ILEI/UEA". Tiu ĉi lasta postulo verŝajne celas mezuri unu el la plej bazan kapablon de ajna instruisto de Esperanto, nome flue kaj kompetente paroli la lingvon. Kiun sencon povus havi la instruado de Esperanto per iu ajn nacia lingvo, anstataŭ ol per Esperanto mem? Kiel prepari bonajn Eparolantajn instruistojn, se ili mem ne kapablas bone paroli la lingvon instruatan? Memkompreneble tio koncernas formalan instruadon de fremda lingvo, kaj oni ne forgesu, ke Esperanto estas la dua lingvo por ĉiuj, eĉ por denaskuloj, kiuj tamen pli facile povos sisteme ellerni ĝin. La informoj kiuj sekvas estas plejparte ĉerpitaj el la jena publikaĵo[5]: "Gvidilo al la elementa kaj meza niveloj de la Internaciaj Ekzamenoj de ILEI kaj UEA (2-a eldono)",

Roterdamo: ILEI/UEA, 1998. Pli detalaj priskriboj — kaj specimenaj ekzamenoj — troviĝas ĉe tiu libreto. Instruistoj de Esperanto interesataj bone prepari siajn lernantojn nepre legu pliajn detalojn ĉe la retejo[6]. Bone preparitaj lernantoj tutcerte atestos la efikecon de la instru-laboro, de la uzata metodo, de la elektita lernilo.

Nuntempe la hungara sistemo estas la subtenanto de la ekzamenoj de UEA/ILEI. Ne hazarde, ĝuste en Hungarujo multaj studentoj elektas ekzameniĝi pri Esperanto dum abiturientaj ekzamenoj. Kóródy kaj aliaj (2008) tiel priskribas la lingvan ekzamensistemon Origo:

"La Centro por Perfektiĝo pri Fremdaj Lingvoj de la Universitato Eötvös Loránd (ELTE ITK) en Budapeŝto, membro de la Asocio de Lingvo-Testistoj en Eŭropo (ELTE) adaptis sian ŝtate rekonitan unulingvan ekzamenon 'Origo' al Esperanto. Tiu ĉi lingva ekzameno, konforme al la principoj de la Komuna Eŭropa Referenckadro por lingvoj (KER), testas la kvar bazajn lingvokapablojn — la aŭskultadon kaj parolkapablon, la legan komprenon kaj la skribadon —, kaj per ekzakta pritaksa sistemo informas la ekzamenatojn pri la nivelo de ilia lingvokono".

Tiuj menciitaj kvar bazaj lingvokapabloj ĉeestu la instruplanojn de niaj instruistoj en lernejoj, kluboj, asocioj. La avantaĝoj de tiu zorgema antaŭpreparo de iliaj klasoj daŭre kaj baldaŭ ekaperos kiel bonaj rezultoj ne nur ĉe ekzamenoj, sed precipe dum konversaciaj rondoj, kaj esperantaj aranĝoj.

Kion oni bezonas por ekzameniĝi? Kiom ĝi kostas?

Eblas nun kandidatiĝi por internaciaj ekzamenoj dum Universala Kongreso aŭ internaciaj aranĝoj okazontaj en Eŭropo, gvidotaj de internacia rajtigita ekzamenantaro. En kelkaj landoj ili troviĝas, nome en Argentino, Armenio, Aŭstralio, Barato, Benino, Belgio, Bosnio-Hercegovino, Brazilo, Britio, Bulgario, Burundo, Ĉeĥio, Ĉilio, Ĉinio, Danio, Ebura Bordo, Francio, Germanio, Hispanio, Hungario, Irano, Islando, Italio, Japanio, Kanado, Korea Respubliko, Kostariko, Kroatio, Kubo, Madagaskaro, Nederlando, Pollando, Rusio, Serbio, Slovakio, Svedio, Svislando, Tajvano, Togolando, Ukrainio, Usono, Vjetnamio. En Brazilo nur prof. Aristóphio Andrade Alves Filho estas rajtigita ekzamenanto.

Tiel legeblas ĉe la paĝo jam menciita de Edukado.net:

"Laŭ Artikolo 8 (c) de la Principa Regularo, Ekzamenotoj devas pagi ekzamenan kotizon, egalan al 60% de M.A.-kotizo de UEA por la loĝlando de la kandidato". Kutime estas rabato por fruanoncitoj kiuj volas ekzameniĝi kadre de UK. Tiuj kiuj volas ekzameniĝi kadre de UK devas anonci sin al la sekretario de IEK. Tiuj kiuj volas ekzameniĝi kadre de aliaj aranĝoj devas anonci sin al la instanco kiu okazigos la koncernan ekzamensesion. Ĉiuokaze, la kotizo estas pagenda ĉe la enskribiĝo".

Kiel marŝas landaj Esperanto-ekzamenoj?

Ĉiu aparta lando rajtas difini sian ekzamensistemon laŭ sia bontrovo. Tio kompreneble devas esti tasko interkonsentita de ĝia instruistaro, laŭleĝe kaj laŭ specifaj kulturaj trajtoj. Ne eblas supozi, ke ĉiuj sistemoj estas egalaj; eĉ en Eŭropo, kies landoj tiom malegalas unu la alian, tio ne okazas. En Ameriko, Afriko aŭ Azio tutcerte la landanoj kaj edukaj aŭtoritatuloj difinos propran sistemon. Tio estas fakto. Tamen, nenio malpermesas sperto-interŝanĝon inter diversaj nacioj, ĉefe se oni konsideras, ke per Esperanto mem tiu internacia kunlaboro restas ege faciligata.

Studemuloj pri tiu temo legu mem pri la internacia situacio ĉe la bonkvalita paĝaro
http://www.edukado.net/pagina/Landaj+Ekzamenoj/16132//
kiu ankaŭ petas de ĉiuj interesatoj "kolekti informojn pri la enlandaj ekzamensistemoj pri Esperanto". Kaj ĝi jene plu tekstas:

"La listigitaj sistemoj povas esti movadaj kaj ŝtataj. Ni klopodas publikigi la regulojn kaj priskribojn de la ekzamenoj kaj nelastkaze ankaŭ ekzamenspecimenojn. Se en via lando ekzistas ekzamensistemo kaj ĉi tie vi ne vidas ĝian priskribon, bonvolu kontakti la redaktoron (de la retejo, mi klarigas) kaj helpi akiri la informojn".

Spite diverstipajn malfacilaĵojn, en Brazilo tradicie Brazila Esperanto-Ligo — BEL, pere de sia Eduka Komisiono, okazigas ĉiujare ekzamensesiojn dum Brazilaj Kongresoj de Esperanto, danke al la volontula laboro de kelkaj esperantistoj. Eblas al ĉiuj do kandidatiĝi kontraŭ modesta monpago, kiu tamen nur helpas la okazigon mem de la ekzamensesio: testpresigo, oficejaj elzpezoj. Kiel fojfoje anoncite, kelkaj regionaj aranĝoj sin proponas okazigi ekzamensesiojn, kies atestiloj tamen nur validas se rajtigitaj de la BEL-Eduka Komisiono. Tiaj partneraj iniciatoj sendube bonvenos, malgraŭ sia malfacileco, se oni konsideras la kontinentan dimension de nia lando!

Kiun vojon elektos BEL (Eduka Komisiono) kaj ILEI – Brazila Sekcio?

Sendepende de la elektita vojo de ĉiu aparta instanco, laŭ apartaj statutaj dispozicioj kaj celoj, sendube la sukceso de tiu grava eduka entrepreno dependos de koncerta kaj partnera agado. Pro sia centjara sperto kaj enlanda pozicio, BEL[6] devos kunordigi la naciskalan ekzamensistemon. La rolo de partneroj de BEL estos tiom utila, kiom ilia laboro ne estos flanka, sed intima kunlaboro. Neniu konscienca estrarano de iu ajn Esperanta instanco volos izolite labori, kiam oni scias, ke la plej bonaj rezultoj devenas de interkonsentita ago de multaj homoj. Kompreneble, referenco al BEL ne signifas nur la malmultajn homojn, kiuj deĵoras en la Centra-Oficejo, alfrontante malfacilajn administrajn ĉiutagaĵojn, sed ankaŭ bone kunordigitan delegitan reton. Kompreneble estraranoj de E-kluboj, ŝtataj asocioj estas ja partoprenantaj membroj de tiu nacia reto. Konscienca estrarano de BEL ankaŭ ne laĉiĝos ĝis ŝi/li sukcesos motivi la entuziasman partoprenon de junularo plena je potencialo. Kiom da anoj de BEJO, ekzemple, studas beletron aŭ ĵus fariĝis licenciitaj lingvoinstruistoj? Ĉu tiuj datumoj estas konataj de BEL kaj de nia E-komunumo? Ĉu eblas esplori kaj koni tiun realon danke al perreta enketo aŭ alimaniere? Se fakte la kunordiga rolo de BEL (t.e., la Eduka Komisiono kaj BEJO) estas centra, kiu estas la rolo neniel flanka de ILEI — Brazila Sekcio? Kara leganto, stariĝu el via komforta seĝo, trinku iomete da akvo, kaj venu malfermkore al tiu diskuto! Pli ol tio, venu al nia nepra kongrua ago post simila pripenso: "kiel mi povas helpe kontribui kun BEL kaj Brazila Sekcio de ILEI por starigo de nacia ekzamensistemo, tamen kapabla atingi ĉiun brazilan regionon?" Aliloke, legeblas: "El tiuj fakaj sugestoj ni alvenu al niaj propraj konkludoj kaj ĉefe ni tuj ekstarigu seriozan trejnprogramon por niaj instruistoj kadre de ĉiu ŝtata Asocio de BEL — Brazila Esperanto-Ligo, kiel nialanda UEA-kunlaboranto"[8]. Tiu temaro eniru la tagordon de ĉiu aparta E-klubo, ŝtata asocio, Esperanta

grupo, kaj ĉiu ano diskutigu tiun temon, produktu kaj publikigu raporton, artikolon kun bonaj sugestoj kaj planojn akompanatajn tamen de detala tabelo pri kiom da horoj ŝi/li povos dediĉi al tiu laboro. Trankviliĝu, kara junulo, kara pensiulo! Ne hazarde mi skribis la vorton "laboro", sed ne la vorton "misio". Ĉu vi scias (kaj mi konscias pri tio, ke mi tuŝas tiklan temon en Brazilo...), ke kreskanta nombro da eŭropanoj ĉi-momente fake kaj profesie laboras ĝuste kiel instruistoj de Esperanto, kiel instruistoj de tiuj instruistoj kaj eĉ kiel profesiaj trejnitaj ekzamenantoj? Ĉu vi dubas pri tio? Vi certe rajtas dubi, sed eble ne post rapida esploro ĉe kelkaj menciitaj retejoj je la fino de ĉi artikolo. Ekzemple, ĉu vi scias ion pri la eblo esti stipendiata de ESF — Esperantic Studies Foundation [9] — por trejniĝi kaj diplomiĝi kiel Esperanto-instruisto? Ne? Bonvolu konsulti la koncernan retejon listigitan sube. Vidu, karulo, karulino, vi certe nur bezonos stipendion, ĝuste pro tio, ke via studperiodo en Pollando, ekzemple, estos paga. Vekiĝu, amiko, vekiĝu, amikino! Niaj gefratoj eŭropanoj kaj nordamerikaj ne estas ludantaj. Ili serioze kaj profesie postulas monon por kursoj de ili gvidataj. Vekiĝu, gejunuloj de ĉiuj aĝoj, vekiĝu kaj agu!

Notoj

[1]http://www.esperanto.de/psi/psi

[2]http://ic-herzberg.de/esperanto/index.html

[3]http://www.edukado.net/pagina/ILEI-UEA+Ekzamenoj/150//

[4]http://eo.wikipedia.org/wiki/Komuna_eŭropa_referenckadro

[5]*Gvidilo al la elementa kaj meza niveloj de la Internaciaj Ekzamenoj de ILEI kaj UEA* (2-a eld.). Roterdamo: ILEI/UEA, 1998.

[6]http://www.edukado.net/pagina/Priskriboj/1536//

[7]http://esperanto.org.br/p/

[8]Nascentes, P. 2009.

[9]http://esperantic.org/eo

Referencoj

KÓRÓDY, Z. et al. *Esperanto de nivelo al nivelo: lingva ekzameno Origo*. Budapest: Idegennyelvi Továbbképző Központ, 2008.

KOUTNY, I. *Angla-Esperanta-Hungara etvortaro pri Lernado kaj Laboro*. Poznań: ProDruk, 2002.

KOVÁTS, K. (redaktoro) k.a. Manlibro pri instruado de Esperanto: projekto "Flugiloj de Malfacila Vento". 2-a eldono. Hago, Nederlando: ILEI: E@I, 2005.

NASCENTES, P. *Komuna Eŭropa Referenckadro: ĉu finfine internacia sistemo por lingvaj ekzamenoj?* En: *Brazila Esperantisto*, 100(334), Julio 2009, p. 5–6.

UEA — UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO. KONSILIO DE EŬROPO. Komuna Eŭropa Referenckadro por lingvoj: lernado, instruado, pritaksado. Rotterdam: UEA, 2006.

Unu amiko malnova pli valoras ol du novaj.

El la "Esperanta Proverbaro" de L.L.Zamenhof

Judaso Ahasvero

Euclides da Cunha

Notoj de la ĉefredaktisto:

Dum 1904, Euclides da Cunha partoprenis per ĵurnalartikoloj la debaton pri landlimaj konfliktoj. Li mallaŭdis la sendon de brazilaj trupoj al Supra Puruso[1] kaj pledis por diplomatia solvo, kiu permesos aneksi la Akrean teritorion. La Barono de Riobranko, brazila ministro pri alilandaj rilatoj, nomumis lin estro de la Brazila-Perua Komisiono por Esplorado de Supra Puruso, ĉe la landlimo inter Brazilo kaj Peruo. Li ekvojaĝis al Manaŭso, ĉefurbo de Amazono, la 13-an de Decembro.

En 1905, li riverveturis proksimume 6400 kilometrojn. La komisiono atingis la enfluejon de la rivero Puruso la 9-an de Aprilo. Reveninte al Manaŭso, li redaktis, kune kun la perua komisiito, raporton pri la ekspedicio. Li ekveturis revene al Rio la 18-an de Decembro. El tiu ĉi ekspedicio rezultis limtraktato inter Brazilo kaj Peruo, la 8-an de septembro, 1909, kiu definitive solvis la limkonfliktojn inter la du regnoj.

La sekva teksto fontis el la travivaĵoj de Euclides da Cunha en tiu regiono.

---

[1]Puruso: rivero originanta en la Peruaj Andoj kaj enfluanta la riveron Amazonon en Brazilo. Supra Puruso estas regiono apud ĉi tiu rivero en la brazila ŝtato Akreo (tiam ankoraŭ teritorio).

En la resurekta sabato la kaŭĉukrikoltistoj de Supra Puruso venĝas siajn malgajajn tagojn. Ĝi estas malstreĉiĝo. Laŭ ilia rudimenta vivkoncepto, en tiu tago sanktiĝas ĉiuj kruelaĵoj. Ili fidas al ia liturgia puno por la plej gravaj eraroj.

Ĉiele, sorĉita de la veno de la resurektinta filo liberigita de la homaj insidoj, la Dihomo indulgeme ridetas je la feroca gajo ĉi-malsupre eksplodanta. Kaj la kaŭĉukrikoltistoj brue sin venĝas pro siaj mizeraj tagoj.

Ili ne havis solenajn mesojn, nek luksajn procesiojn, nek kortuŝajn piedlavajn ceremoniojn, nek emociajn predikojn. La tuta Sankta Semajno fluis por ili kun la tortura sameco de tiu senmova ekzistado, konsistanta el egalaj tagoj de seneco, ĉiamaj duonfastoj, malĝojoj kaj ĉagrenoj, kiuj por ili similas al senfina Sankta Vendredo, sin streĉanta angore, senfine, tra la tuta jaro.

Iuj memoras, ke en la indiĝenaj regionoj, dum tiu funebra tempo, ĉesas ĉiuj aktivecoj: la stratoj senhomiĝas, ĉiuj negocoj paraliziĝas, la vojoj dezertiĝas; la lumoj agonias ĉe la flagretantaj fajroj sur la longaj kandeloj kaj la voĉoj mallaŭtiĝas ĉe la preĝadoj kaj spiritaj izolejoj, kiam granda mistero falas sur la urbojn, vilaĝojn kaj la profundajn landinternojn, kie la malĝojiĝintaj homoj kuniĝas al la supernatura ĉagreniĝo de Dio. Kaj, absorbitaj, ili opinias, ke tiuj sep strangaj tagoj, ĉie pasemaj

El “Ĉe la Marĝenoj de Historio”

Tradukis Benedicto Silva

kaj ĉie intence fiksitaj pli elstare ol la aliaj pli nombraj tagoj de feliĉo, tie tiuj tagoj signifas por ili ilian tutan ekzistadon, monotonan, obskuran, plej doloran kaj anoniman, ĝene fluantan laŭ neŝanĝebla dolora vojo, sen komenco kaj sen fino, de la fermita cirklo de “vojoj”. Tiam, tra iliaj simplaj animoj, eniras en ilin, krepuskigante la plej belbrilajn miraĝojn de ilia fido, la densa ombro de ia unike pesimisma koncepto pri la vivo: fakte, la Universala Savinto ilin ne savis; li forgesis ilin por ĉiam, aŭ eble ne vidis ilin, kiuj ja troviĝas tiel forlasitaj surborde de la soleca rivero, kiu en la agitiĝo mem de siaj akvoj estas tiu, kiu la unua eterne forfluas de tiuj mizeraj kaj senhomaj landanguloj.

Sed ili ne ribelas, nek blasfemas. Kontraŭe al itala artisto, la malklera kaŭĉukrikoltisto ne troprofitas la bonecon de sia dio per ekscesoj da ofendoj. Li estas pli forta; li estas pli digna. Li rezignaciis pri sia sufero. Li ne murmuras. Li ne preĝas. Plurfoje liaj angoraj preĝoj supreniras al la ĉielo, kun maskita amareco de ĉagreniĝo kontraŭ la diulo; sed li ne plendas. Li havas la konadon praktikan, realan, solidan, nemensan, neracian, senigitan je metafizikaj mildiĝoj, solidan, densan kaj severegan, nome, ian grandan ŝarĝon subpremantan al li la tutan vivon: la konadon de fatalo. Kaj li submetiĝas al tiu fatalo, sen preteksti la kovardan peton faritan surgenue. Regas super lia rudimenta kriterio ia konvinko eble tro objektiva, aŭ naiva, sed malcedema, ĉiumomente eniranta tra liaj okuloj, lin timigante: li estas ja malbenita de la distanco mem lin foriganta de homoj. Kaj la grandaj okuloj de Dio ne povas malsuprenіri ĝis tiuj marĉegoj, sin makulante. Al li ne utilas pentofari, kio estas ja prudenta rimedo ribeli, postulante ian rangaltigon en la malpreciza skalo de feliĉeco. Estas konkurantoj pli feliĉaj, pli bone protektataj, pli multenombraj, kaj jen kio ŝajnas al ili pli efika: pli rigardataj, en kapeloj, en preĝejoj, en katedraloj, kaj en riĉaj urboj, kie paradas la pompo de suferado en nigra uniformo, aŭ la pompo fulmobrila en disradiado de larmoj, kaj pedante montranta malĝojon…

Tiam — li antaŭeniru plu, indiferente kaj mute, stoike, en la profunda izoliteco de sia malfeliĉo.

Cetere, al li nur estas permesate sin puni pro ia malbenita ambicio kondukinta lin al tiuj lokoj, por fordoni lin, mankatenita kaj sklavo, al la nepunitaj ŝakristoj, kiuj lin trompas — kaj tiu ĉi peko estas la puno mem, ŝanĝanta lian vivon en senfinan pentofaradon. Kio restis al li por

fari, tio estas malkovri kaj forŝiri ĝin el la arbaraj duonombroj, por montri ĝin nuda, en ĝia teruraga formo, al la malproksima homaro.

Por tio, tamen, la Eklezio donas al li sinistran komisiiton: Judason; kaj unu solan feliĉan tagon: la sabaton antaŭfiksitan por la plej sanktaj atencoj, por la konfeseblaj tumultoj, por la mistika malkvieteco de la elektitoj, kaj por la diigo de la venĝo.

Sed la pajla ulaĉo, plej banala, ĉiuloka kaj ĉiutempa, ne sufiĉas por lia kompleksa kaj peniga misio. Ĝi venas tro multe batata tra longaj jarcentoj, tiel multe tretata, tiel multe malfortiĝinta kaj tiel multe ŝtonumata, ke ĝi populariĝis en sia senlima mizero, monopoligante universalan malamon kaj etiĝante pli kaj pli antaŭ tiel multaj homoj, kiuj ĝin malamas.

Al li estas almenaŭ necese reliefigi ties pli viglajn kaj akrajn trajtojn, kaj maski, sur ties drapa vizaĝo, per karbaj strekoj, ian tiel tragikan turmentegon, kaj iamaniere tiel similan al la realo, ke la eterna kondamnito laŭŝajne resurektis samtempe kun sia dia viktimo, por estigi pli spontanan mallogon kaj ian pli kompreneblan revenĝon, ĝissate kontentigante la ŝokitajn animojn de la kredantoj per la kiel eble plej perfekta figuro de siaj mizero kaj teruraj agonioj.

Kaj la kaŭĉukrikoltisto aŭdacas fari tiun skulpturan mirindaĵon, helpe de siaj etaj infanoj, kiuj deliras, bruemaj, ridetante, kurante ĉiuflanken, serĉante disŝutitajn pajlojn kaj mallogan miksaĵon de malnovaj, netaŭgaj vestoj, ravataj de la bizara tasko, tiel subite rompanta la tristan monotonecon de ilia senŝanĝa kaj kvieta ekzistado.

La Judasa pupaĉo fariĝas, kiel ĝi estis farata ĉiam: el pantalono kaj eluzita ĉemizo, ambaŭ fuŝe kudritaj, plenaj de pajleroj kaj ĉifonoj; brakoj horizontale malfermitaj kaj kruroj je angulo, sen artikoj, sen reliefoj, sen faldaĵoj, terure starigita per paliso meze de korto. Supre, ia malgracia bulo, kvazaŭ kapo. Ĝi estas la vulgara pupo, kiu aperas ĉie kaj kontentigas la plimulton. Ĝi tamen ne kontentigas la kaŭĉuko-rikoltiston. Por tiu ĉi, ĝi estas nur la bloko, el kiu li eltiros la statuon, kiu estos lia ĉefverko, la eksterordinara kreaĵo de lia kruda genio longedaŭre afliktata de sortobatoj, kaj en kiu aliaj eble distingos mirindajn trajtojn de ia subtilega ironio, sed kiu estas por li nur la konkreta esprimo de doloriga realo.

Kaj li komencas penege prilabori la monstran figuron: li elstarigas kaj modlas al ĝi la nazon; kavigas al ĝi la orbitojn; reliefigas ĝian frunton; pligrandigas ĝiajn zigomojn; pintigas ĝian mentonon per zorga kaj lanta masaĝo; pentras ĝiajn brovojn, kaj, per du longaj strekoj, li pacience malfermas ĝiajn okulojn ordinare tristajn kaj plenajn je mistera esprimo; li desegnas ĝian buŝon ombrumita per maldensaj lipharoj, kies pintoj defalas ĉe la buŝanguloj. Sekve, li vestas ĝin per ankoraŭ uzeblaj pantalono kaj ĉemizo el kotono; piedvestas ĝin per eluzitaj, difektitaj botoj...

Li retroiras kelkajn paŝojn. Li admire rigardas ĝin dum kelkaj minutoj. Li studas ĝin.

Ĉirkaŭe la idaro, nun silenta, atendas senmove, spektante la disvolviĝon de la elpensaĵo ĝin miriganta.

Li revenas al sia homaĉo: retuŝas unu palpebron; intensigas signifoplenan distiriĝon ĉe ĝia lipa arkiĝo; li ombrumas iom pli ĝian vizaĝon, kavigante ĝin; li kurbigas ĝiajn brakojn; li aranĝas pli bone ĝian kapon; li tiras kaj korektas al ĝi la veston...

Li faras novan retroiron, ritman, lantan, ree rigardante ĝin por ampleksi per unu ekvido, la sintezon de ĉiuj tiuj linioj, kaj por rekomenci la laboron kun ia obstino kaj ia torturo de nekontentebla artisto. Novaj retuŝoj, pli delikataj, pli zorgaj, pli gravaj: ia subtila nuanco de ombro, ia

preskaŭ nerimarkebla strio en la faldita buŝo, ia eta tordo de la kolo ĉirkaŭvolvita per ĉifono, kvazaŭ kravato...

Kaj la monstro, lante kaj lante, per ne sentebla transformiĝo, fariĝas homo. Almenaŭ la iluzio estas entuziasmiga…

Subite, la malklera statuisto faras ian geston pli kortuŝan ol la plej angoran *parla!* de Mikelanĝelo; li demetas sian propran ĉapelon kaj ĵetas ĝin sur la kapon de la Judaso; kaj ĉiuj liaj idetoj retropaŝas kun ekkrio, vidante respeguliĝi en tiu maleleganta kaj fiaŭgura estaĵo la figuron de ilia propra patro.

Ĝi estas dolora triumfo. La enlandano skulptis la malbeniton laŭ sia figuro. Li venĝas sin kontraŭ sin mem: finfine, li punas sin pro la malbenita ambicio, lin kondukinta en tiun regionon; kaj alfrontas la moralan malfortecon, kiu rompas la ribelimpetojn, malfortecon pli kaj pli enpuŝantan lin en la malsuperan planon de sensukcesa vivo, kie la infaneca kredemo lin jungis, kiel sklavon, al la marĉa grundo de la ŝakristoj lin tromplogintaj.

Tio ĉi tamen ne sufiĉas al li. La materia portreto de lia malfeliĉo ne devas resti senutila en malvasta korto de barako, droninta en nepenetrebla densaĵo, kiu forŝtelas de antaŭ la propraj okuloj de Dio la bildon de liaj eterne nekonataj ĉagrenoj. La rivero, kiu fluas preter lia pordo, estas vojo kondukanta al la tuta Tero. La tuta Tero rigardu lian malfeliĉon, lian korŝiran kolereg on, lian mizeron, lian maljustan ekstermiĝon, vundefrape eksterigatajn de stranga kaj muta heroldo...

Malsupre, ekde la antaŭa tago vidiĝas speciale konstruita floso el kvar malpezaj stangoj streĉe kunligitaj. Ĝi atendas la makabran vojaĝanton. La enlandano tuj kondukas ĝin tien, tirante ĝin malsupren, tra la oblikvaĵoj de la riverbordoj striitaj de malpuraĵ-torentoj.

Iomete poste la demona figuro stariĝas subtenata, sur la poŭpo de la leĝera floso.

Li faras en ĝi la lastajn plibonigojn: korektas ankoraŭfoje la vestojn; metas sur ĝian dorson sakon plenan de balaaĵoj kaj ŝtonoj; pendigas ĉe ĝia zono ian rustiĝintan, neutilan pistolon sen eksplodigiloj, aŭ eluzitan tranĉilaĉon; kaj, farante kuriozajn rekomendojn aŭ donante plej strangajn konsilojn, li fine forpuŝas la fantastan floson al la riverfluo.

Kaj Judaso, farita Ahasvero, antaŭeniras malrapide al la mezo de la rivero. Tiam, la plej proksimaj najbaroj, scivole amasiĝante sur la supro de la riverbordoj, bruege partoprenas en tiu foririgo, per ripetataj pafadoj de rifloj. La kugloj batas la fluidan surfacon, krispigante ĝin kaj eniĝas en la floson, splitante ĝin; ili atingas la teruran flosgvidanton; ili traboras ĝin. Ĝi ŝanceliĝas momente sur sia flosanta piedestalo skurĝata de pafoj, hezitema, kvazaŭ ĝi sencele flosus dum kelkaj minutoj, ĝis ĝi ekiras denove laŭ la ĝenerala direkto de la fluo. Kaj la malgracia, tragika, timige burleska figuro, kun siaj senordaj gestoj de demono kaj histriono, spitante malbenojn kaj ridojn, daŭrigas sian funebran vojaĝon sen destino kaj sen fino, malsupren, ĉiam malsupren, ŝanceliĝe, kirliĝe, submetite al la fluo, flosante sur la profunda akvo.

Ĝi ne haltas plu. Laŭmezure kiel ĝi antaŭeniras, la vaganta ĉifonfiguro dissemas ĉirkaŭe afliktecon kaj teruron; la birdoj, timigite, kaŝas sin, mutaj, en la interno de la frondaroj; la pezaj amfibioj subakviĝas singarde en la profundaĵon, ektimigite de tiu ombro, kiu ĉe vesperiĝo kaj ĉe mateniĝo plilongiĝas, funebre sin sternante sur la rivera surfaco; la viroj kuras

[2]Laŭ legendo, skulptinte la statuon Davido, Mikelanĝelo, surprizate de ĝia perfekteco, martelis ĝin kaj ekkriis *Parla!* (itale: Parolu!).

al la armiloj kaj, farante la krucosignon kaj premante la ellasilojn kun kolero miksita kun ektimo, senkompate pafadas kontraŭ ĝin.

La judaso ne plu sukcesas pasi preter la plej malriĉa barako sen esti pafata aŭ ŝtonvundata.

La kugloj siblas ĉirkaŭ ĝi; aliaj traboras ĝin. Vipite de la ŝtonoj, la akvo krispiĝas je ondaj cirkloj; la floso ŝanceliĝas; kaj, akompanante ĝiajn movojn, la brakoj de la judaso svingiĝas, kvazaŭ ĝi dankus, per fuŝitaj riverencoj, la kolerajn elmontrojn konsistantajn el tempesto de pafoj kaj krioj, korŝiraj sarkasmoj kaj ekzorcizoj, kaj, super ĉio, de malbenoj revivigantaj, per la lanta parolmaniero de la malkleraj kamparanoj, tiun eĥon de anatemo, kiu vibras de jam dudek jarcentoj:

— Iru, malfeliĉulo!

Ĝi iras. Ĝi ne haltas. Ĝi malproksimiĝas, tirate de la akvofluo. Ĝi liberigas sin de la persekutantoj. Ĝi glitas silente tra rekta kaj longa rivervojo; ĝi ĉirkaŭiras la tre mildan kurbiĝon de dezerta riverbordo. Subite, trans riverkurbiĝo, jen aperas alia domo: surprizite de ĝi ĉe la riverrando, virinoj kaj infanoj forkuregas tra la krutegaĵo supren, kriege plorante. Kaj tuj poste, de supre, venas la pafado, la ŝtonĵetado, la ofendoj, la mokoj.

Forpasis du aŭ tri minutoj da kriado kaj turmento, ĝis la vaganta judo, malsuprenirante, transpasis la maksimuman trafpovon de la pafila trajektorio.

Kaj ĝi malsupreniras, malsupreniras... Finfine, ĝi ne plu iras sola. En ĝia dolora marŝado partoprenas aliaj kunsuferantoj, aliaj teruregaj kriplaĵoj sur samaj etaj flosoj drivantaj laŭ la kaprico de la fluo. Malsamaj laŭ la aspekto kaj gestoj, ili aperas el ĉiuj flankoj: jen tre hirtaj, ŝnurligitaj al fostoj ilin subtenantaj; jen kvazaŭ elartikiĝintaj, renversiĝantaj pro plej malgrandaj ŝanceliĝoj, konfuzitaj kiel ebriuloj; jen tragikaj, kun levitaj brakoj, minacantaj, malbenantaj; aliaj humilegaj, forlasitaj al profunda ĉagreniĝo; kaj, iafoje, pli kompatindaj montriĝas tiuj pendigitaj per ŝnuro fiksita al ekstremo de maldika kaj kurba masto, balanciĝantaj, sufokitaj...

Ĉiuj preterpasas duope, laŭvice, malsuprenirante, lante malsuprenirante...

En iuj lokoj la rivero pliarĝiĝas je grandegaj cirkloj; tie ĝi kvietiĝas; ĝia fluo tre lante turniĝas kaj rondiras ĉirkaŭ la bordoj, desegnante vastegan spiralon de neperceptebla kaj perfida kirlo. La vagantaj fantomoj eniras tiujn vastajn haltejojn el senmova, marĉa akvo; ili ekhaltas nur por momento. Ili kuniĝas. Ili ĉirkaŭiras unuj la aliajn, en malrapida kaj silenta parado. Ili miksiĝas. Je la unua fojo renkontiĝas la senmovaj kaj falsaj rigardoj de iliaj hipokritaj okuloj; kaj per furioza agitado konfuziĝas iliaj paralizitaj gestoj kaj rigidaj korpoj. Oni havas la iluzion vidi eksterordinaran senbruan tumulton kaj tre agitatan kunvenon sekrete okazantan, kies voĉoj ne aŭdiĝas pro sufokiteco.

Poste, iom post iom, ili foriras. Ili malproksimiĝas..., disiĝas. Kaj, drivante laŭ la kaprico de la fluo, kiu rektiĝas ĉe la lasta spiralo de la kvietakvejoj — jen ili, laŭvice, unu post la alia, lante, procesie, malsuprenveturas la riveron...

Pli bona estas gajno malgranda ol granda malgajno.

El la “Proverbaro Esperanta” de L.L.Zamenhof

La sinonimludo

Francisco Stefano Wechsler

Ĉi-foje ni pritaktos la sinonimgrupon konsistantan el la vortoj *senti*[*], *sensi*[8], *percepti*[1], *rimarki*[*] kaj *sperti*[*]. (Asterisko indikas fundamentecon kaj numero indikas la oficialan aldonon al la Universala Vortaro.) Uzantoj ofte ilin konfuzas, ĉefe *senti* kun *sensi* kaj *percepti* kun *rimarki*.

Senti, laŭ PIV-2005, signifas esence: "ricevi en konscion impreson, ĉu internan, ĉu kaptatan ekstere". Jen kelkaj Zamenhof-aj ekzemploj: *sur ĉiuj stratoj estis **sentata** la odoro de ansera rostaĵo*; *en la dormo oni **sentas** nek malsaton, nek soifon*; *kion koro **sentas**, lango prezentas*; *vi ĉiuj **sentas**, ke la verda standardo estas io pli, ol signo de lingvo*.

Kie do kuŝas la diferenco inter *senti* kaj *sensi*? Denove laŭ PIV-2005, *sensi* posedas pli striktan signifon, nome "ricevi eksteran impreson per certaj organoj aŭ histoj". Ekzemple: *tigroj kapablas **sensi** sian kaptoton je longa distanco*. La klasikaj sensoj de homo estas kvin: aŭdado, flarado, vidado, gustumado tuŝado. Moderne oni inkluzivas pliajn du: la pozicisenson (fake nomatan propriocepto), per kiu oni perceptas la pozicion kaj movon de sia propra korpo kaj ĉi ties partoj; kaj la ekvilibran, kiu permesas onin stari aŭ paŝi sen renversiĝo. Do *sensi* emfazas anatomian aŭ fiziologian aspekton, ne atentante pri la efiko de sensaĵoj sur la konscion. En la unuaj ekzemploj de la antaŭa alineo, oni povus uzi *sensi* anstataŭ *senti*, kaj la diferenco estus nur nuanca. Notu ankaŭ la jenan ekzemplon: *ŝi **sentis** la preman etoson, kiu okazas dum familiaj kunsidoj*; kvankam la sentado verŝajne originis el la sensoj, la frazo emfazas la enkonsciigon de la etoso, do *sentis* estas pli konvena ol *sensis*.

Kion diri pri *percepti*? En la portugala, ambaŭ *rimarki* kaj *percepti* estas ordinare tradukeblaj per la verbo *perceber*, kaj jen la kaŭzo de ofte okazanta konfuzo. Tamen, laŭ PIV-2005, *percepti* signifas esence "akiri scion pri certa objekto, ĉu per eksteraj sensaĵoj, ĉu per internaj": *la favorkoreco de Dio, kiun **perceptas** nur aparta individuo*[Z]. Perceptado estas do intelekta procezo. Pro sia specifa signifo, *percepti* efektive ne estas uzata ofte. En la antaŭa ekzemplo, eblus diri: *ŝi **perceptis** la preman etoson, kiu okazas dum familiaj kunsidoj*; sed la signifo estus iom malsama, nome, ke ŝi ne nur sentis la preman etoson, sed ankaŭ per sia menso iel traktis la aferon.

Ni nun parolu pri *rimarki*, kies PIV-a difino estas: "distingi kaj aparte atenti per observado". Notu, ke al ĝia signifo kontribuas du esencaj elementoj: distingo kaj observado. Jen tri ekzemploj, la unuaj du ĉerpitaj el Zamenhof, la tria ĉerpita el Kabe: *mi **rimarkis** inter la nematuruloj junulon senprudentan*; *oni **rimarkis** vian foreston*; ***rimarki** eraron en teksto*. Konklude, kvankam por rimarki oni ja bezonas sensojn, oni ankaŭ distingas kaj observas detalojn, propraĵojn ktp.

(Daŭrigo sur la paĝo 21.)

La nominalverba karaktero

Maria Nazaré Laroca

1. Enkonduko

Kvankam ĝi estas malfacila tasko, mi tamen prezentas resumon de la ĉefaj ideoj de mia doktoriga tezo, kies titolo estas *La nominalverba karaktero de la aspekto en Esperanto*,[1] kaj kiun mi defendis en 2009 (UFF, Niterói – RJ). Ĝia ĉefa celo estas evidentigi, ke la aspekta funkcio en Esperanto estas esprimata per komunikaj kaj gramatikaj strategioj, interrilate kun la semantika valoro[2] de la verba formo aŭ de la participa formo.

2. Metodologio

La uzitaj datumoj apartenas al du korpusoj, eltiraĵoj el dudek literaturaj rakontoj. La unua korpuso konsistas el dek tekstoj origine verkitaj en Esperanto; la dua, el dek esperantigitaj tekstoj. Celante riĉigi la tezon, mi elektis rakontojn verkitajn de diversaj aŭtoroj kaj tradukistoj, kies lingvoj apartenas al pluraj lingvo-familioj, nome: latinidaj (franca, itala, portugala); ĝermanidaj (angla, norvega, dana); slavaj (rusa, pola, bulgara, kroata); uralo-altajaj (japana, hungara, korea); kaj la ĉina.

3. Konceptoj

Ni difinas aspekton kiel gramatikan kaj komunikan reprezenton de la interna tempa karaktero de la verbo kaj de la participo, t. e., la maniero laŭ kiu okazis, okazas aŭ okazos la ago, evento, procezo aŭ situacio, koncerne al siaj daŭro, fazoj kaj/aŭ plenumo, kodigitaj kiel verbo aŭ verba nomo, t.e., participo.

Ni rigardas la esperantan participon kiel heterogenan vortklason, karakterizitan kiel verbon kaj nomon; temas do pri nominalverba formo. Laŭ tiu ĉi lasta termino, oni konsentas, ke ĝi apartenas al ambaŭ klasoj. Ĉar la lingvistikaj kategorioj distribuiĝas laŭ grada skalo, aŭ kontinuo, participo estas konsiderata transira formo inter verbo kaj adjektivo, kiu funkcias kiel adjektivo kaj adverbo, ne perdante sian verbecan kvaliton. Rilate al sia origina formo, participo estas verbdevena; sintakse, ĝi funkcias kiel adjektivo, adverbo aŭ substantivo. En la funkcioj adverba kaj adjektiva, ĝi povas sintakse postuli la akuzativon, kiel ekzemple, en ĉi tiu peco el esperante verkita rakonto de kroata aŭtoro, la participo-adjektivo *fumanta* en la sintagmo *fumanta cigaredon*:

Kvankam mi ankoraŭ ne kredis, ke tiu alta kaj elegan-

---

[1]Oni povas legi la verkon ĉe la jenaj adresoj:
http://edukado.net/biblioteko/diplomlaborajhoj?iid=39&s=3fe6dcf9d963a6c830280ad2d21fbb6d
http://edukado.net/biblioteko/diplomlaborajhoj?mr=1&ordo=lastaredakto&desc=1&dat[kreinto]=10619

[2]N.R.: La aŭtorino uzis la vorton *Aktionsart*, kiu estas tradicia lingvistika nomo el la germana. Ni tamen opinias, ke esperantlingvaj tekstoj devas esprimi ĉion per Esperanto.

de la aspekto en Esperanto

Resumo de doktoriga tezo

te vestita juna damo, ***fumanta cigaredon****, kun belstatura korpo kaj ore blonda hararo, estas mia najbarineto.*

Estas du universalaj, ĝeneralaj kaj aspektaj uzadoj: perfektivo kaj imperfektivo. La imperfektiva aspekto aperas, kiam lingvuzanto eksplicite indikas la internan tempan strukturon de unu situacio. En la perfektiva aspekto mankas tia indiko: ĝi celas priskribi la verban procezon kiel neanalizeblan tuton, kiel demonstras la kontrasto en la ĉi-subaj tekstoj:

(a) *Tiel* ***dirante****, Kisuke* ***metis*** *manon ĉe sia brusto.*

(b) *Tiel* ***dirinte****, Kisuke* ***fermis*** *sian buŝon.*

La japana tradukisto bone esprimis la aspektan kontraston inter la imperfektiva kaj perfektiva aspekto, per la gramatika sufiksa aspektindikilo *-ante*, por la disvolviĝanta procezo, kaj per la indikilo *-inte*, por la plenumita procezo, t.e., dirante/dirinte. La pasintaj verboformoj metis kaj fermis rol-

as perfektive en tiu supra kunteksto, krome ili aldonas semantikajn nuancojn, t.e., ili aspekte esprimas punktecajn okazaĵojn.

Do, estante propreco de predikateco, la gramatika aspekto en Esperanto prezentiĝas kiel komunika elekto de lingvuzanto. Tiu ĉi elektas prezenti la internan tempecon de la situacio perfektive aŭ imperfektive, pere de disponeblaj esperantaj rimedoj por aspektigo.

Kiel plian ekzemplon, ni observu ĉi tiun tekston, esperantigitan el hungara verko:

(c) *Kiam la princino duonan horon pli malfrue en la parko* ***promenadis****,* ***venis renkonte al ŝi*** *juna viro en ĉasistvesto.*

En tiu frazo oni rimarkas incido-skemon, t.e., du okazaĵoj estas interrilatigitaj: la renkonto de junulo kun la princino (*venis renkonte al ŝi*); kaj la promenado de la princino (*kiam* (ŝi) *promenadis*). La unua estas perfektive prezentita kiel tuto, dum la dua estas imperfektiva, kiel montras la imperfektiva aspektigilo[3] *-ad*, esprimanta agdaŭron.

Koncerne al la komunika nivelo, perfektiva aspekto estas uzata por esprimi, ke unu okazaĵo incidas sur alian, dum ĝia disvolviĝo, t.e., *venis renkonte*; tiam la fona okazaĵo estas esprimata per imperfektiva aspekto: *promenadis.*

4. Aspekto-tipoj en Esperanto

Aspekto (ankaŭ nomata interna tempo) estas lingvistika kategorio pli malnova ol tempa kategorio, kaj disting-

[3]Aspektigilo: vorto, afikso aŭ esprimo, kiu atribuas aspekton al verba esprim-strukturo, vorto aŭ afikso.

iĝas disde ĉi tiu, malgraŭ ilia forta interrilato. Dum tempo estas *deikta*[4] kategorio, t.e., ĝi estas difinita de la rilato al la interparola momento kaj tiamaniere dependas de la eldira momento, aspekto estas simbola kategorio, propreco ekskluziva de predikateco, ĉar ĝi ne rilatas al la interparola momento.

El la tri esperantaj gramatikaj tempoj, nur la estanta (signita de *-as*) esprimas aspektan sencon (imperfektivon). La aliaj, estinta (*-is*) kaj estonta (*-os*), estas aspekte neŭtralaj aŭ nedifinitaj.

En nia diplomlaboraĵo, ni identigis tri bazajn gramatikajn aspektojn en Esperanto: imperfektivon, perfektivon kaj prospektivon. La pasinta pasiva participa morfemo *-it* indikas perfektecon kaj rezultecon (plenumitan agon); la estanta pasiva participa aspektigilo *-at* esprimas imperfektecon (agon komencitan, sed nefinitan); la estonta pasiva participa aspektigilo *-ot* montras iome eblan perfektivecon, tio estas, prospektivan aspekton.

Tiamaniere ni elmontris la prototipan karakterizon de la esperanta aspekteco, nome, la aspektsemantikan funkcion de la participoj, ĉefe rilate al la koncepta riĉeco de la kontrasto inter la aspektigiloj *-ata* kaj *-ita*.

Ni ankaŭ prezentis la iteracian (aŭ ripetan) aspekton, nome, kodigon de la kvanta flanko de la aspektoj (precipe perfektiva kaj imperfektiva). Pro la statdiverseco inter aferoj reprezentataj de verba predikateco, la subtipoj de tiuj aspektoj povas kombiniĝi. Konsekvence, ni proponas fleksteblan subdividon, ebligantan identigi, en la sama predikateco, pli ol unu aspektan kombinaĵon, alivorte: ne ekzistas rigida kontraŭstaro inter tiuj aspektigiloj.

Laŭ la diskuto supre elvolvita, ni asertas: kaj la imperfektiva aspekto kaj la perfektiva prezentas subtipojn, kiel ni klarigos sekve.

Imperfektiva aspekto: ĝia predikateco distingas la jenajn aspektajn fazojn: komencan fazon (*komencan* aspekton), disvolviĝan fazon (*daŭran* aspekton); aŭ finan fazon de stato de aferoj (*ĝisfinan* aspekton).

Perfektiva aspekto: konsideras la situacion kiel solan tuton; alivorte, ĝi ne indikas fazojn. Krom tiu tuteco-signifo, ni ankaŭ rimarkas la aspektajn nociojn pri punkteco aŭ momenteco, rezulteco kaj plenumiteco, kiuj karakterizas la perfektivajn aspektajn tipojn en Esperanto.

Prospektiva aspekto: ĝi prezentas intencan sed nekomencitan agon, t.e., la staton antaŭ la agkomenco. La prospektivo ofte enhavas ian nuancon de intenceco.

Iteracia aŭ ripeta aspekto: ĝi montras aspektan kvantigon de la imperfektiva aŭ perfektiva aspekto; kaj en Esperanto oni ĝin ordinare esprimas per komunikaj kaj morfologi-sintaksaj rimedoj, kiel la uzado de adverboj kaj adverbaj kvantigaj sintagmoj; ĉirkaŭfrazoj (ekzemple: la verbo *kutimi* + infinitivo); afiksoj (*re-*, *-ad*); ankaŭ per propoziciaj kaj tekstaj tipoj.

Ni trovis en niaj korpusoj la aspektan funkcion esprimitan per la jenaj gramatikaj aspektigiloj:

a) estanttempa sufikso: *-as*; aktivaj kaj pasivaj participaj morfemoj: *-ant*, *-int*, *-ont*; *-at*, *-it*, *-ot*;

b) leksikaj afiksoj: *-ad*, *ek-*, *re-*, *el-*, *tra-*, *fin-*, *ĝis-*.

c) aspektigaj adverboj kaj adverbaj sintagmoj: *dume*, *daŭre*, *plu*; *ree*, *plurfoje*, *kelkfoje*; *ofte*, *kutime*, *tage*; *subite*, *ĝuste en tiu momento*, *fulme*, ktp;

d) verbaj ĉirkaŭfrazoj: *komenci* + infinitivo; *daŭri* + infinitivo; *kutimi* + infinitivo;

e) verbaj argumentoj: jen ekzemplo, el esperanta versio de bulgara rakonto:

La ventego ***lin batas sur la dorson*** *[…]*

[4]Deikta: celanta lokigi fakton space kaj tempe, ne difinante la fakton.

La predikato *lin batas sur la dorson* starigas iteracian imperfektivecon pro la semantikaj karakterizoj de argumento-subjekto, t.e., la ventego (“fortega kaj daŭra vento”). Estus malsame, se la subjekto de propozicio rolus, ekzemple, kiel la ŝtelisto, en: *la ŝtelisto batas la virinon kaj forkuras*; tiu lasta predikato (*batas la virinon*) esprimas perfektiv-aspektan sencon.

f) temp-subordigitaj adverbaj propozicioj; kunordigitaj alternativaj propozicioj; alternativaj polisindetaj adiciaj propozicioj: jen ekzemplo el esperanta versio de pola rakonto:

***Jen** ŝi **malaperas**, **jen** ŝi surprize **reaperas**.*

Tiu ĉi alternativa korelativeco, *jen… jen* en propozicioj enhavantaj verbojn en estanta tempo naskas ripetan kaj aspektan sencon; la prefikso *re-* (en *reaperas*) plifortigas tian aspektan nocion. Ni ankaŭ rimarkas punktan perfektivecon pro la leksika, aspekta klaso de atingo en la verboj *aperi*, *malaperi* kaj *reaperi*.

Ni devas ankoraŭ reliefigi lingvajn komunikajn strategiojn, kiujn ni distingas en rakontoj el la korpusoj, kiel ekzemple: la ripetadon de afiksoj, radikoj, verboj aŭ adverboj; la tekstan tipon (rakontan kaj/aŭ priskriban).

Tiamaniere, ĉiuj supremenciitaj faktoroj gravas por taŭga laŭaspekta interpretado de esperantaj propozicioj en rakontoj.

La rezultoj trovitaj per nia esploro indikas kelke da tendencoj rilate al la uzado de gramatikaj aspektigiloj en Esperanto, kiel ekzemple:

a) por esprimi imperfektivan aspekton: la ofta uzado de la estanta verbotempo (*-as*); elekto de la aktiva estanta participo (*-ant*) prefere al la pasiva formo (*-at*); granda uzofteco de la adverbforma aktiva estanta participo (*-ante*). Ni ankaŭ rimarkas la uzadon de la imperfektiviga aspektigilo *-ad* kiel imperfektivigan strategion, ne nur en imperfektivigo de daŭro sed ankaŭ de ripetado; la prefero de la aspektigilo *ek-* anstataŭ la ĉirkaŭfrazo *komenci* + infinitivo por kodigi la komencan imperfektivon;

b) por esprimi perfektivan aspekton: uzado de la estinta pasiva participo kiel adjektivo (*-ita*), kun senco rezultiga; granda ripetkvanto de la prefikso *ek-* por esprimi la perfektivan punktan aspekton;

c) por esprimi la prospektivan aspekton: uzado de la estonta aktiva participo kun adjektiva funkcio (*-onta*). Oni konstatas ankaŭ evidente maloftan uzadon de la prospektiva aspekto, fakto indikata de datumoj en la korpusoj esploritaj.

Rilate al iteracia aŭ ripeta aspekto (t.e., la lingvistika strategio por taksi la imperfektivan aspekton kaj la perfektivan), la analizitaj rakontoj indikas la uzadon de diversaj komunikaj gramatikaj rimedoj interagantaj kun la verba semantika valoro. Tiuj rimedoj ampleksas, ekzemple, la estantan tempan finaĵon *-as* kiel strategion por imperfektigado iteracia; la uzadon de specifaj verbaj argumentoj kaj kvantigaj adverbaj sintagmoj; la uzadon de leksikaj aspektigiloj, kiel la prefikso *re-* kaj la sufikso *-ad*; la ripetadon de afiksoj kaj adverboj. Estas grave ankaŭ rimarkigi la rolon de la komunika kunteksto, nome la priskriban aŭ rakontan teksto-tipon.

5. Ekzemploj el rakontoj en la korpusoj

Esprimo de la imperfektiva aspekto:

a) Uzado de la estanta tempo-sufikso *-as* por imperfektiva daŭra aspekto:

*Nur virino malriĉa restis tie… Ŝi **ploras** kaj ne **volas** foriri.* (El esperante verkita rakonto de rusa aŭtoro.)

b) Uzado de la participaj sufiksoj, la estanta *-ant* kaj la pasiva *-at*:

•Participo adjektiva estanta aktiva (-anta):

[…] *sed Anna Aleksejevna ĉiam balancis la kapon kaj* ***estis diranta*** *al la edzo: — Demetrio, kiel tio okazis?* (El rakonto tradukita el la rusa.)

•Participo adverba estanta aktiva (*-ante*):

En la boato la krimulo kaj parenco kutimas maldormi la tutan nokton, ***flustrante*** *al si reciproke la personajn travivaĵojn.* (El rakonto tradukita el la japana.)

•Participo adjektiva estanta pasiva (*-ata*):

Ĉiu ekpuŝo, ĉiu ekbato estis ***akompanata*** *de laŭtaj ekkrioj de la turmentantoj.* (El esperante verkita rakonto de rusa aŭtoro.)

c) Uzo de la aspektigilo *ek-* kaj de la ĉirkaŭfrazo *komenci* + infinivo: komenca imperfektiva aspekto:

Iom post iom mi ***ekloĝis*** *malsupre,* ***komencis*** *manĝi en la kuirejo por servistoj.* (El rakonto tradukita el la rusa.)

Inácio **ektremis***, kiam li aŭdis la kriojn de la advokathelpanto, ricevis la teleron al li donitan kaj* ***ekmanĝis*** *sub tempesto da finomoj* […] (El tradukita brazila rakonto.)[5]

La aspektiga prefikso *ek-* implicas malsamajn aspektajn nuancojn en la vortoj *ektremis* kaj *ekmanĝis*. En *ektremis*, ĝi montras momentan agon, t.e., laŭ vido de punkta perfektiva aspekto; en *ekmanĝis*, pro la semantika klaso de la verboformo *manĝi* (aktiveca verbo), la aspektigilo *ek-* indikas daŭran ago-komencon (t.e., komencan imperfektivan aspekton).

d) Uzo de la aspektigilo *-ad*; daŭra imperfektiva aspekto: […] *Ŝi vortgalope* ***babilas***, ***babiladas.*** (El esperante verkita rakonto de hungara aŭtoro.)

En tiu frazo, oni povas vidi interesan sencefikon per kontrasto inter du verboformoj, kies radiko estas la sama, nome *babil-* en estanta tempo: *babilas* (imperfektivo de daŭro); *babiladas* (ĉi-lasta enhavas la aspektigilon *-ad* (imperfektivo de daŭro).

Inácio malrapide ***manĝadis****, sen kuraĝo levi la okulojn de sur la telero* […][6] (El brazila rakonto, verkita de Machado de Assis kaj tradukita de brazilano.) Per la aspektigilo *-ad* la tradukinto esprimas imperfektivon de daŭro.

e) Uzo de la aspektigiloj *fin-* kaj *ĝis-* por fina imperfektiva aspekto.

Fina imperfektiva aspekto indikas la finan fazon de daŭra ago kaj povas esti deduktita el la prefiksa uzo de la aspektigiloj *fin-* (verboforma radiko) kaj *ĝis* (prepozicio):

'Sunfloro' unue ***fintrinkis*** *sian laktan kafon kaj ŝaltis transistoran ricevilon.* (El esperante verkita rakonto de pola aŭtoro.)

Per tia ridinda malgrasa sumeto, eĉ plej ŝpareme, li apenaŭ povos ***ĝisvivi*** *la finon de la monato.* (El esperante verkita rakonto de franca aŭtoro.)

Esprimo de la perfektiva aspekto per la aspektigilo de estinta pasiveco *-ita*:

a) *La fiŝo estis* ***kaptita****,* ***senditа*** *al la vendejo,* ***vendita*** *kaj* ***portita*** *al kuirejo, kie la servistino ĝin distrancîs per granda trancîlo.* (El dana rakonto tradukita de dano.)

b) *La ruĝa invitkarto kun oritaj vortoj estis trifoje* ***malfermita*** *kaj trifoje* ***remetita*** *sur la skribtablon.* (El esperante verkita rakonto de ĉina aŭtoro.)

La rezultigaj perfektivaj participoj *malfermita* kaj *remetita* montras ripetan (aŭ iteracian) aspekton per interago kun la kvantrilata adverbo *trifoje*, kaj per la prefikso

---

[5] *Inácio estremeceu, ouvindo os gritos do solicitador, recebeu o prato que este lhe apresentava e tratou de comer, debaixo de uma trovoada de nomes […]* (Machado de Assis: 2004, p. 107) Tradukis esperanten Paulo Sérgio Viana.

[6] *Inácio ia comendo devagarinho, não ousando levantar os olhos do prato.* (Machado de Assis: 2004, p. 108)

re- en *remetita*.

c) *Paŭlino iris al la dormoĉambro, senvestiĝis, lavis sin, surmetis noktoĉemizon,* ***brosis la hararon centfoje****,* ***laŭ la rutino de pluraj jaroj****.* (El esperante verkita rakonto de angla aŭtoro.)

La sintagmo *brosis la hararon centfoje, laŭ la rutino de pluraj jaroj*, montras iteracian perfektivan aspekton krom ia kutimeca senco. La ripet-aspekto de la predikato *brosis la hararon centfoje* rezultas el interago de la semantika valoro de la verboformo *brosi*, kiu enhavas la ideon de ripetado, kun la kvantrilata adverbo *centfoje*; plia senco pri kutimeco estas kaŭzita de adverba konformiga konstruo: *laŭ rutino de pluraj jaroj*, kies nukleo estas la vorto *rutino*.

Esprimo de la prospektiva aspekto: uzo de la participa estontaktiva aspektigilo *-onta:*

Mi ne informis ilin pri tio, kion mi estis ***montronta*** *al ili.* (El rakonto tradukita el la franca.)

5. Finaj rimarkigoj

Tiamaniere, nia tezo pruvas, ke la internacia lingvo Esperanto estas lingvistike studebla objekto same kiel naciaj lingvoj. Ĝi ankaŭ evidentigas, ke la aspekta funkcio en Esperanto estas esprimata per komunikaj kaj gramatikaj rimedoj, kiuj interrilatas laŭ la semantika valoro de verba aŭ participa formo.

Ni konfirmas, ke Esperanto disponigas leksikajn kaj gramatikajn rimedojn, kiuj ebligas uzonton kodigi aspekto-kategoriojn, nome: imperfektivon, perfektivon kaj prospektivon. Imperfektivo kaj perfektivo povas esti rigardataj laŭ kvanta vidpunkto, kaj ili tiamaniere naskas iteracian aspekton.

Laŭ nia esploro, Esperanto ne nur havas verbajn tempojn, sed ĝi disponigas tri ĝeneralajn gramatikajn aspektojn, ĉefe esprimatajn de participaj formoj, per sufiksaj aspektigiloj, nome: imperfektivon (*-ant*, *-at*), perfektivon (*-int*, *-it*) kaj prospektivon (*-ont*, *-ot*). Spite al sia malofta uzo en niaj korpusoj, la prospektiva aspekto montriĝis precipe per la aspektigilo *-onta*.

(Daŭrigo de "La sinonimludo".)

Por fini tiun ĉi artikolon, ni diskutu iomete pri la verbo *sperti*. Ĝi posedas du klare distingeblajn signifojn, laŭ PIV: "lerni per sperto"; kaj "esti submetita al io, suferi aŭ ĝui". Nur la dua koncernas nian diskuton. Jen tri ekzemploj Zamenhof-aj: *li alkutimiĝis al tio, li neniam* ***spertis*** *amon*; ***sperti*** *novan seniluziiĝon*; *mi* ***spertis,*** *ke la Eternulo benis min pro vi*. En ĉiuj tri ekzemploj oni povus uzi *senti* anstataŭ *sperti*; tamen sperti inkluzivas ideon pri submetiĝo.

Ĉu vi opinias, ke ni harfendas? Eble vi pravas. Tamen regado de nuancoj gravas por plena posedo de iu ajn lingvo. Oni tre ofte propagandas la simplecon de Esperanto. Sed ĝi estas ankaŭ preciza, kaj ni konservu ĝin tia ĉi.

Kriptogramo

José Saraiva Matos

Unue observu, ke sube kaj dekstre troviĝas kvadratetoj, kelkaj enhavantaj numerojn. Aliflanke, sube kaj maldekstre videblas difinoj. Solvinte, vi vidos, en la reliefigitaj kvadratetoj, literojn, kiuj formas la nomojn de du neforgeseblaj esperanto-batalantoj. Numeroj egalaj, literoj ankaŭ egalaj. Plifaciligos la solvon la liter-numer-tabelo, sed unue multe cerbumu, antaŭ ol konsulti ĝin.

1	Situanta en paralela aŭ vertikala ...		9	18	10	17	9	13	9
2	Ĝimkano en angla lingvo.	18		5	8	2	9	16	9
3	Prezentanta tumulton. (PL)	17	7		7	13	17	9	1
4	Araba glavo, kun klingo larĝa kaj kurba.	15	10	5		17	9	6	11
5	Ortangula apudforma konstruaĵo, kun...	4	9	21	10		10	8	11
6	Glatigi tolaĵon, ŝtofon aŭ paperon		9	13	9	16		6	10
7	Urbo em Malgranda Azio (hodiaŭ Denizli).	13		11	19	10	8		11
8	Homo, tribo, popolo loĝanta apude. (PL)	16	9		4	9	6	11	1
9	1. Glaceigi. 2. Fridigi		13	9	15	10	7	5	10
10	Servanta por distingi	19		9	8	6	10	17	9
11	Rilata al la specifecoj de la katolika eklezio.	18	9		10	8	9	16	9
12	Germana havenurbo, kaj lando.	2	9	5		7	6	18	11
13	Troviĝanta sub fremda regado k deziranta...	10	6	3	19		16	17	9
14	Vira nomo, i. a. de la fama pentristo Vinĉi.		3	11	16	9		19	11
15	Petra fragmento, falinta sur Teron.	9		6	11	13	10		11
16	Unu el la ŝtatoj de Usono.	10	16		10	9	16	10	11
17	Praktikanto de sodomio.		11	19		5	9	16	11
18	Ĉefurbo de Moldavio.	8		22	10		3	12	11
19	Solene deklari ke mortinto estas sankta.	8	9		11	16	10	21	10
20	Kiel unua, proponi aŭ fari.	10	16	10		10	9	17	10
21	Oka monato de la franca kalendaro.	14	13	11	6		9	13	11
22	Havanta la formon de sako.		9	8	14	11		5	9
23	Verbo barakti en estanta tempo.	4		6	9	8	17		20
24	Plata elstaraĵo ĉe fasado de domo. (AK)	4	9		8	11	16	11	
25	Nutraĵrezerva, en triploida histo.	9	13	4		5	3	16	11
26	Ĉefurbo de Sankta-Kito kaj Neviso.	4	9	20	3		3	6	11
27	Globa organeto interne de la ĉela nukleo...	16	7	8	13	3		13	11
28	Kuniĝi gluante en unu mason.	9	18	13	7	17	10		10

Klarigoj: PL = plurale; AK = akuzative.

TAKE–2011

Situo de la Kongresejo

8a TAKE (Tutamerika Kongreso de Esperanto)

46a BKE (Brazila Kongreso de Esperanto)

31a BEJK (Brazila Esperantista Junulara Kongreso)

de la 9a ĝis la 14a de Julio 2011

San-Paŭlo - Brazilo

Procezoj de regiona integriĝo en la amerika kontinento: la rolo de Esperanto

www.kongreso2011.org

Kongresejo:
Faculdade Santa Marcelina (FASM), Unidade Perdizes, Rua Dr. Emílio Ribas, 89

Amerika Komisiono

Brazila Esperanto-Ligo

Ŝtata agentejo pri turismo

Esperanto-Asocio de San-Paŭlo